James Yorkston,

Molly Malone

tradukita de Jean-Marc Leclercq

En bela Dublino,
kie ravas la ino,
Ekvidis dolĉegan mi Molly Malone.
Ŝi travagis stratarojn
puŝante la varojn.
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn proponas mi!

Estis ŝi vendistino,
sed ne miris Dublino,
Ĉar ankaŭ tiel faris gepatroj de ŝi.
Ili vagis stratarojn,
puŝante la varojn,
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn proponas mi!

Jen febro ekfortis,
pro tio ŝi mortis,
La fino alvenis al Molly Malone.
Fantomo nun vagas,
neniu nun pagas
Por kardioj, miltuloj puŝataj de ĝi.
Fantomajn kardiojn
Fantomajn mitulojn,
Fantomajn moluskojn nur vendas nun ĝi.

Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de JEAN-MARC LECLERCQ *(∗1961-10-10).*

Arg-374-1886 (2013-11-25 11:01:43)

James Yorkston,

Mol Ní Mhaoileoin

tradukita de Seán de Fréine

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en la Irlandan de Seán de Fréine.

Arg-374-817 (2007-05-16 20:17:33)

Laŭ la irlanda kantlibro "Sing Along Linn" la tradukinto de tiu ĉi kanto estas Seán de Fréine, 36 Nutgrove Park, Cluain Sceach, Baile Atha Cliath 14, Irlando. Tel: 00353-(0)1-2694660 e-mail: defreine@iol.ie